

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

N-o 44, 7. aŭgusto 1921.

Ĵurnalo internacia, universala, sendependa
eldonata de Teo Jung, Köln-Horrem (Germ.)

* Eliras semajne. *

Belaj Tagoj en Dresden.

La Raporto pri la Antaŭkongreso (vidu paĝon 2).

La Sekreto de la Sukceso de „Esperanto Triumfonta“

konsistas en tio, ke la eldonanto povis presi la unuan Internacian semajnan grandformatan ĵurnalon en propra presejo. Tial liaj promesoj ne estis senbazaj, kaj de post la 20-a de novembro 1920 „Esperanto Triumfonta“ eliradas regule kaj senpaŭze ĉiun semajnon kaj eĉ aperas dum la kongresaj semajnoj.

Hodiaŭ — post nur unujara ekzistado — ET atingis eldonnombron de minimume 2500 ekzempleroj, el kiuj 2000 estas abonataj aŭ aĉetataj. ET jam estas elmetata kaj ope vendata en stacidomaj gazetvendeloj, publikaj kioskoj aŭ librejoj de ĉ. 80 lokoj en 20 landoj.

Ĝis la XIV-a Internacia Esp. Kongreso 1922 ET devos atingi kaj certe atingos minimume 3000 pagantajn abonantojn kaj aĉetantojn; ĉar de post oktobro aŭ plej malfrue novembro ĝi elirados el internaciligita eldonejo, en ankoraŭ pli granda formato (kvarkolona), sur pli bona papero, kun aktualaj esp. klišaĵoj en ĉiu numero kaj kun pli zorge kunmetita enhavo.

Gesamideoj el ĉiuj landoj, kiuj ankoraŭ ne estas abonantoj aŭ regulaj aĉetantoj de ET, ankaŭ vi helpu al nia progresema entrepreno, kies celo estas la iom-post-ioma kreado de nepre serioza, vere atentinda, kiel eble plej multflanka, universala, internacia, sendependa esperantista ĵurnalo, kiu ankaŭ impresos la neesperantistan publikon, kiu per si mem estos plej bona propagandilo por Esperanto kaj plej konvinka pruvo por ĝia taŭgeco kaj disvastiĝo.

Niaj novaj Abonprezoj.

Ni liveras al ne-germanaj landoj: 52 n-ojn (tuta jaro) por 100 germ. mk., 10 ŝil., 10 sv. fk., 20 fr. fk., 5 hol. guld., 10 skand. kr., 2 dolaroj aŭ 25 liroj (lirojn ni akceptas nur el Italio); 26 n-ojn (duona jaro) por duona prezo. Al Baliko kaj Balkano ni liveras 26 n-ojn por 25 germ. mk., al Polio 250 pmk., al Finnlando 25 fmk., al Aŭstrio 100 kr., al Hungario 75 kr., al Ĉeĥoslovakio 35 kr.

Oni pagu per monbiletoj aŭ bankĉekoj, sed ne per poŝtavizoj, ĉar la poŝto donas parte nur 2/3 de la kurza valoro.

La abonon povas esti komencataj per iu ajn numero.

Germanoj abonu ĉe la poŝto (poŝta gazetlisto, komplementoj 5 kaj 9); kvaronjare 15 mk.

Anoncoj

kostas po kvadracentimetro 1 germ. mk.; ĉe grandaj aŭ ripetataj anoncoj rabato ĝis 40% (por abonantoj kaj esp. firmoj kromrabato de 20%).

Anoncetoj

kostas por 1-2foja enpresado kaj po 25 vortoj la prezon de 5 n-oj de ET aŭ 5 germ. mk. aŭ 5 resp.-kup. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la monon de la abonkonto (5 n-oj). Por 3-5foja enpresado ni kalkulas la duoblon. Familiaj anoncetoj (naskiĝo, fianĉiĝo, edziĝo, morto) estas senpage.

Anoncetoj pri korespondo kaj interŝanĝo

kostas por 1-2foja enpresado kaj po 15 vortoj la prezon de 5 n-oj de ET aŭ 5 germ. mk. aŭ 5 resp.-kup. Ĉe rektaj abonantoj ni deprenas la monon de la abonkonto (5 n-oj). Por 3-5foja enpresado ni kalkulas la duoblon.

Estonte ni forlasos rimarkojn pri „ĉiama kaj tuja respondo“, ĉar ni kredas, ke por ĉiu anonceto estas morala devo respondi.

Germanoj povas pagi monon al nia poŝtĉekkonto: Köln 70865 por Teo Jung, Horrem.

Esp. Kabaredo „La Verda Kato“ en Parizo.

Ĉiu parizano aŭ eksterlandano venanta Parizon konas la kvartalon de Montmartre, kie, apud larĝaj belaj stratoj, estas malgrandaj, mallarĝaj kaj zigzagantaj stratetoj, ĉiam suprenirantaj ĝis la pinto de la monteto Montmartre, kie nun levigas impona, sed iom tro severa katedralo de Sankta Koro de Montmartre (Sacré Coeur de Montmartre).

La kvartalo estas loĝata de talenta, originala, sprita, sed senordona kaj senmona artistaro: poetoj, kantistoj, verkistoj, pentristoj, karikaturistoj. En tiu ĉi medio naskiĝis la unuaj kabaredoj, kie en malgranda ĉambro, apud tabloj kun glasoj da biero, kantistoj kaj poetoj kantis kaj legis siajn verkojn. Sentimentalaj, ironiaj, gajaj, sarkasmaj, kritikaj, ili respegulis la francan spiriton kaj spritecon. Nenio estis indulgata de la aŭtoroj de la aktualaj kantoj: ĉiuj plejfortuloj de la politika mondo estis senrespekte, sed tre sprite kritikataj kaj mokataj en iliaj verkoj, ĉiu grava fakto estis prezentata sub komika aspekto. Vortludoj, spritaĵoj, gajeco, petolemo, ŝprucis el la linioj de tiuj ĉi kupletoj. Tiel naskiĝis „Le chat noir“ (La nigra kato), kaj ĝin sekvis multaj aliaj: „Les Noctambules“ (La Noktululoj), „La Pie qui chante“ (La Kantanta Pigo), „La lune Rousse“ (La flavruĝa luno) ktp.

La pasintan laron kelkaj gajaj gejunuloj, inter kiuj nia fervorulo Raymond Schwartz, havis ideon krei esp. kabaredon. Ĉu vere Esperanto estas seka, „sciencoza“ lingvo, ĉu, post 33 jaroj de ekzistado, oni diskutos nur pri „io“ aŭ „ujo“ kaj pri vortaregoj? Ĉu Esperanto ne estas sufiĉe fleksebla, gracia, sonora por spritaĵoj, vortludoj, petolemaj aludoj, amuzaj frazturniĝoj, komikaĵoj? Ili decidis fondi esp. kabaredon en la kafejo ANDREA, 7, rue Notre-Dame de Bonne-Nouvelle (apud la grandaj bulvaroj). Je la sama loko kunvenas ĉiutage de 10 ĝis 11 samideanoj. Trapasantoj estas tute invitatataj. Certe, grandaj afiŝoj de „La Verda Kato“ ne estis gluitaj sur ĉiuj domoj de Parizo, gazetoj ne parolis pri ĝia fondiĝo, konataj artistoj ne estis dungitaj por ludi tie, sed areto da amatoroj formis bonan aktoraron. La spektakloj ne okazis, certe, ĉiutage, sed nur unu fojon monate, aŭ eĉ pli malofte, sed la malgranda salono estis ĉiam plena kaj gravaj blankharaj maljunuloj ridis, kiel junuloj kun kreskantaj lipharoj.

La lasta tre sukcesinta spektaklo, pri kiu ET jam parolis, okazis dum la kongreso en Orléans.

Nun „La Verda Kato“ organizis merkrede la 20. julio „miaŭdon“. Sur improvizita scenejo kun simpla verda kurteno, ne movata de maŝinoj, sed de brakoj, aŭdiĝis en la unua parto de la spektaklo esp. deklamajoj kaj kantoj. S-o Nels malfermis la miaŭdon per sprita propaganda parolado, en kiu la vortludoj ludis pli gravan rolon ol la argumentoj. S-o Le Cornec kantis „La Papo kaj la Sultano“. F-ino Gaillot gracie deklamis „La Infanoj“. Nun venis la vico de la animo de la kabaredo s-o Raymond Schwartz, kiu legis sian „Filozofaĵojn“, amuzajn kaj petolemajn kaj „La Lampeto“ de Presber, kiu do ne estas lia ĉefverko. La akton finis la ĉarma blonda f-ino Marga Rineta kantanta plej novajn parizajn romanojn kaj dancojn: „Li sekvis ŝin“ = amuza historioto de pariza modistino, fokstroton „Ĉarma midineto“ (Midineto = moda aŭ kudra laboristino de parizo) kaj „Kanton de Floriano“. Graciaj gestoj, esprimiga mimiko donis ankoraŭ pli da viveco kaj realeco al la kantoj. Ni ne forgesu ankoraŭ la pianistinon f-inon Clarence kaj la violoniston s-on Pagliano.

La dua parto konsistis el duakta burleska komedio „La hundo parolanta“ verkita de nia maljuna kaj malnova, sed ĉiam juna de amo kaj karaktero, samideano Daniel Eyquem. Kvankam okupanta la gravan postenon de juĝisto de pariza apelacia tribunalo, li trovas ĉiam tempon ekster la profesia devo, por viviĝi Esperanton.

La amatoroj ludis la komedion kun facileco kaj en konkordo, la vortoj fluis, la indigno, miro, rido venis tute nature sen iu ajn ĝeno aŭ artefareco. La kabaredo havis grandan sukceson. Esperanto ankaŭ. La aktoroj kaj la aŭtoro estis multe aplaŭdataj.

Ĉu eble iam oni aŭdos la „Verdan Katon“ dum internacia kongreso?

ALO.

VI-a Nacia Kongreso de la Italaj Esperantistoj en Trento.

PROGRAMO.

16. Aŭgusto: 10-a horo
1. Malfermo de la kongreso. Saluto al la aŭtoritatoj kaj al la kongresanoj.
2. Kunmeto de la Prezida Oficejo.
3. Vizito de la kastelo „Buon Consiglio“ kaj de la malliberejo, kie tragike elmetis la lastan spiron la prezidanto de la Trentinaj Esperantistoj, adv. d-ro Valentino Peratoner.
15-a horo
4. Raporto pri la Internacia Kongreso de Praha. Raportanto Kav. Giuseppe Pedrotti el Trento.
5. Raporto pri la agado de la Itala Esperanta Federacio (FEI) de post oktobro 1920 ĝis julio 1921. Raportanto d-ro Pier Carlo Monti el Milano.
6. Organizo de la esperanta movado dum 1921-1922. Raportanto Kav. Alfredo Stromboli el Roma.
19-a horo
Promenado al „Ponte Alto“. Vizito de la grandioza akvofalo kaj vespermanĝo.
17. Aŭgusto: 9-a horo
7. Konsideroj kaj proponoj pri la nacia esperanta movado. Raportanto Kav. adv. Verona el Verona.
8. Esperanto kaj la Junaj Skoltoj. Raportanto adv. kom. Scotti el Bologna.
9. Esperanto kaj Filozofio. Raportanto pastro Modesto Carolfi, prof., el Corte Maggiore (Piacenza).
15-a horo
10. Esperanto kiel kunfratigilo de la popoloj. Raportanto d-ro Angelo Filippetti, urbestro de Milano.
11. Instruado de Esperanto en la lernejoj. Raportanto prof. Francesco Mosna el Trento.
12. Esperanto en la turista movado. Raportanto adv. Filippo Palmeggiani el Bologna.
13. Fermo de la VI-a kaj difino de la venonta VII-a Kongreso.
20-a horo
Esperanta prezentado de la dramo „Partita a scacchi“ (Ŝakludado) de Giuseppe Giacosa, kaj de la burleskaĵo „Tie ĉi oni parolas esperante“.
Okaze de la kongreso oni organizos Esperantan Ekspozicion de esperantaj verkoj. Ĉiuj kongresanoj ricevos senpage la gvidlibron „Trentino“ de Cesare Battisti esperante tradukitan (d-ro Mondini), 265 paĝa, riĉe ilustrita verko.
La kongreso okazos en la solena ĉambrego de la komunumaj lernejoj, Via Verdi, n-o 5, II. etaĝo.
18. Aŭgusto: 8-a horo
Forveturo al Rovereto, kie oni faros viziton al la tiea Milita Muzeo kaj promenadon al „Kastelo Dante“ en Lizzana.
Trento, la 22-an de julio 1921.
La Prezidanto: D-ro Mondini.

Junularo.

Jubileo de Esp. Jun. Rondeto „ERO“.
La 15-an de sept. 1921 pasos dek jaroj de post la fondiĝo de l' esp. junulara rondeto „ERO“ en Varsovio. Okaze de tiu jubileo, la en Varsovio restintaj ERO'anoj festos la 15-an de septembro kaj pasigos solene la vesperon. Dek jaroj de plaj teruraj travivaĵoj disigis nin ĉiujn tra la tuta mondo. Estus tial al ni tre agrable refoje nun interrilatiĝi. ERO'anoj, skribu!

Edvardo Wiesenfeld
(E. Lonkopolanski)
Varsovio, Pol., Biala 3.

Anoncetoj.

ATENTU! Ni serĉas ĉ. 30 gejunulojn el diversaj landoj por aranĝi interesan intiman rondon korespondan. Ĉefkondiĉo: perfekteco en Esperanto. Mallonga biografio dezirata. Detalaj informoj volonte donataj. Fratoj Fethke, Bydgoszcz (Polio), ul. Petersona 11.

Korespondo kaj Interŝanĝo.

S-o Oswald Kynast, Breslau (Germ.), Neudorfstr. 115-1 Gts. deziras korespondi kun allandanoj per leteroj aŭ bildkartoj. Markoj bildflankaj.

Korespondadon kun samideanoj el ĉiuj landoj per leteroj, poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝon de poŝtmarkoj deziras J. Düllmann, Hagen i. W. Germ., Körnerstr. 75.

Rudolf Weiss (lernanto), Dux, Bohemulo, Bilinerstr. 549, deziras korespondi kaj interŝanĝi pm. nur kun komencantoj.

Otto Weselmann, Düsseldorf (Germ.), Nordstr. 77, deziras interŝanĝi pensojn per leteroj kaj pk il. kun gesamideanoj.

F-ino Maria Manzo, Via del Popolo 42, Potenza (Ital.) deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesamideanoj per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

F-ino Cimarrusii Maria, Via Meridionale, Potenza (Ital.) deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesamideanoj per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

F-ino Concetta Casiero, Via N. Riviello, Potenza (Ital.) deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesamideanoj per poŝtkartoj ilustr. kaj leteroj.

Kiu sendos al mi 30 50 nesamajn poŝtmarkojn de sia lando, ricevos same tiom da germanaj poŝtmarkoj Hermann Wolfert, Instruisto, Menzelen-West, Rejnlando, Germ.

S-o Andor Spiro, Miskolcz, Hungarulo, Templom u 5, deziras korespondi per ilustr. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Mi atendas markojn unue.

Fritz Thiel, Swinemünde (Germ.), Seestr. 2, deziras korespondi kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj ilustr. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Ĉiuj gesamideanoj, kiuj sendas ĉ. egalval. nedif. stampitajn poŝtmarkojn negermanajn, tuj ricevos 10 aŭ 20 poŝtkartojn ilustritajn de la belega Rejnlando Paul Becher, Köln a Rh., Burgunderstr. 7. — Ankaŭ korespondas per poŝtkartoj, leteroj (bfl.) kun ĉiuj landoj.

S-o Liudas Aiseika, Šiauliai, Litovio, Pasadna g-ve 19, interŝanĝas per poŝtkartoj (bfl.).

F-ino Eugenia Butnevičaitė, Šiauliai, Litovio, States g-ve 8, interŝanĝas kaj korespondas per poŝtkartoj (bfl.).

F-ino Zofia Valcekauskaitė, Šiauliai, Litovio, Pasadna g-ve 19, deziras korespondi per poŝtkartoj ilustritaj (bfl.).

5a Internacia Foiro de Frankfurt m.



25. septembro ĝis 1. oktobro 1921.

Importo. 30 branĉoj. Eksporto.



Presajoj en germana, angla, dana, franca, hispana, itala, nederlanda, norvega, sveda kaj esperanta lingvoj.

„Antaŭ-Katalogo“ kun plurlingva kaj esperanta registro, „Listo de Komercadoj“ en Esperanto.

Detalajn informojn petu tuj de

Messamt (Esperanto-fako) Frankfurt m. Germ.

Freiburger Kassenschrankfabrik KARL SCHULER Freiburg i. Br. (Germ.)

Speciala Fabriko por monŝrankoj, libroŝrankoj, nepriŝteblaj ŝrankoj por dokumentaroj, sekretaj murŝrankoj kaj kasetoj.

— Eksporto al ĉiuj landoj. —

Oni petu specialan proponon.

Reprezentantoj serĉataj.

La Lastaj Tagoj de D-ro Zamenhof

Memorlibreto, presita sur arta papero, kun 11 ilustraĵoj laŭ originalaj fotografaĵoj pri la funebra ceremonio kaj la tombo de la Majstro,

estos vendata

dum la kongreso en Praha po 30 germ. mk. resp. ĉsl. kr. La duono estas destinita

por Monumento

sur la tombo de D-ro Zamenhof.

Ni rekomendas la belan verketon al la atento de ĉiuj samideanoj.

Natur-Teatro (Tagluma Scenejo) Freiburg i. Br.

(200 m. larĝa, 100 m. profunda, la plej granda en la mondo).

PASIO-FESTLUDOJ

laŭ la originalteksto de Oberammergau sub gvidado kaj kunefiko de la famekonataj bavaraĵ Kristo- kaj Judas-prezentantoj Adolfo kaj Georg Fassnacht.

Ludotagoj de 16. julio ĝis fino de sept., ĉiun merkredon, sabaton kaj dimanĉon.

1500 kunefikantoj.

Korusoj. — Orkestro. — Granda Orgeno.

Muzika gvidado: Franz Philipp.

La tribuno por la spektantoj enhavas 9000 lokojn.

Prospektoj pri enirprezoj kaj loĝejoj estas riceveblaj de la centrejo

B. Gotthart, Kaiserstr. 132, tel. 879.

La Festluda Direkcio.

Kontorartikloj ĉiuspecaj

paperaĵoj, stampiloj, stampil-kusenoj, emajl-elpendaĵoj (ŝildoj) ĉiaspecaj.

Liverado de libroj germanaj kaj esperantaj.

Reala servado. ★ Malkaraj prezoj.

Seriozaj reprezentantoj serĉataj.

Specimenoj sendotaj kontraŭ resp.-kup., plipagon mi repagos.

Rob. Pfennigwerth, Hirschfelde (Saksujo).

Poŝtekonto Dresden n-o 4761. — Bankkonto Loebauerbank Hirschfelde (Saks.).

Poŝtmarkoj Nederlandaj.

Ĉiu, kiu sendos al mi minimume 200 da afrank ilantropiaj, kamppoŝtaj, aerpoŝtaj poŝtmarkoj de sia lando, ricevos de mi saman kvanton da holandaj poŝtmarkoj. Skribu legeble vian adreson.

S-o C. D. de Smet, Noorddijk 60, Worme: v. ser, Holando.

Sinjoroj Esperantistoj!

Se vi volas helpi serloze la internaciigon kaj disvolvigon de la lingvo Esperanto, abonu senpere je la nova internacia ilustrita semajna gazeto

„De Prinses“.

Provizore tiu ĉi semajna gazeto aperos en la franca, germana, angla, holanda kaj esperanta lingvoj. Ĝi enhavas ĉion tutmondan (ekz. sporto, arto kaj sciencoj, agrikulturo, brutarbredado ktp., mallongvorte „la naturo en vorto kaj bildo“ de la tuta mondo).

Sendu vian abonon kaj pagon senprokraste al nia reprezentanto s-o J. J. v. Wensveen, Warmoesstraat 118, Wormerveer, Holando. Ekzemplero 15 cendojn plus afranko. Jarabono plus afranko: 7 galdenojn 80 cendojn.

Abonu tuj je tiu ĉi interesa gazeto! Kolportistoj havas rabaton.

Esperanto kaj la Komercado.

Firmoj, folioj, esperantaj komercaj grupoj kaj esperantistoj bonvolu komuniki al mi la spertojn faritajn koncerne la praktikan uzadon de Esperanto.

Otto Pilhofer, Nürnberg .19, Germanujo

„SCHARLACH“ ACETILEN-LAMPOJ

por domo,
metio, industrio, trafiko kaj agrikulturo.



Tablo- kaj murolampoj. — Ĉiuspecaj lanternoj.

Seriozaj firmoj postulu katalogojn kaj detalojn.

Fabriko de Metalajoj

Otto Scharlach, Nürnberg,
(Germanujo).

SILKAJ BRODAĴOJ

REKTE EL ĤINUJO,
. LA SILKOLANDO!

Esperanto-brodaĵo kun surskriboj esperantaj, verda stelo, globo ktp.

Bibliaj brodaĵoj kun sanktaj tekstoj.

15:20 aŭ 29:39 cm * dol. 2.50 aŭ 4.50.

Brodaĵoj de birdoj, floroj, vidaĵoj ktp. samformataj kaj samprezaj.

Specialaj laboroj laŭ modelo.

Sendo per rekomendita letero.

Dol. 1.00 = 10 stamp. respond.-kup. aŭ 3 ŝilingoj, poŝtmandatoj aŭ kambioj de Thos. Cook & Son.

Specimeno kontraŭ 1 resp.-kup.

C. S. Gee,

HAI-YEN (tra Shanghai), Ĥinujo.

Korespondado en Esperanto!

7a Internacia Foiro de Breslau

Aŭtuna Foiro :: 4-a ĝis 8-a de Septembro 1921.

Teksaĵoj, ledajoj, ŝuoj, ornamaĵoj kaj armetiaj objektoj, meblaro, pormastrumad-artikloj, sportbezonaĵaro, papero kaj paperaĵoj, kontor-uzaraĵo, manĝaĵoj kaj ĝuaĵoj, kemiaĵoj teknikaj artikloj.

Informojn donas:

Breslauer Messe-Gesellschaft m. b. H.

ESPERANTO-FAKO

BRESLAU I (Germ.), Ohlauerstr. 87.